KVARA KARESMA DIMANĈO - 14a de marto 2010.

ĈI TIU VIA FRATO ESTIS MORTINTA, KAJ DENOVE VIVAS - Komentario al la Evangelio de P.Alberto Maggi OSM

Lk.15, 1-3, 11-32

En tiu tempo ĉiuj impostistoj kaj pekuloj alproksimiĝis al li, por aŭskulti lin. Kaj murmuris la Fariseoj kaj la skribistoj, dirante: "Ĉi tiu akceptas pekulojn kaj manĝas kun ili". Kaj li parolis al ili la jenan parabolon, dirante: "**Unu viro havis du filojn; kaj la pli juna diris al sia patro: Patro, donu al mi la heredotan parton de la havo. Kaj li dividis inter ili siajn vivrimedojn.**

Kaj post ne multaj tagoj la pli juna, kolektinte ĉion, forvojaĝis al malproksima lando; kaj tie li disperdis sian havon per diboĉa vivado. Kaj kiam li jam elspezis ĉion, forta malsato okazis en tiu lando, kaj li komencis havi mankon. Kaj li iris, kaj aliĝis al unu el la loĝantoj de tiu lando; kaj ĉi tiu lin sendis sur siajn kampojn, por paŝti porkojn. Kaj li deziris plenigi sian ventron per la karoboj, kiujn la porkoj manĝis; kaj neniu donis al li. Sed reveninte al si, li diris: "Kiom da dungitoj de mia patro havas panon abunde, sed mi ĉi tie pereas de malsato! Mi leviĝos, kaj iros al mia patro, kaj mi diros al li: Patro, mi pekis kontraŭ la ĉielo kaj antaŭ vi; mi jam ne meritas esti nomata via filo".

"Faru min kiel unu el viaj dungitoj". Kaj li leviĝis, kaj iris al sia patro.

Sed kiam li estis ankoraŭ malproksime, lia patro lin vidis kaj kortuŝiĝis, kaj kurinte, falis sur lian kolon kaj lin kisadis. Kaj la filo diris al li: Patro, mi pekis kontraŭ la ĉielo kaj antaŭ vi, kaj mi jam ne meritas esti nomata via filo. Kaj diris la patro al siaj servistoj: Alportu rapide la ĉefan robon, kaj lin vestu, kaj metu ringon sur lian manon kaj ŝuojn sur liajn piedojn; kaj alportu la grasigitan bovidon kaj buĉu ĝin, kaj ni manĝu kaj estu gajaj; ĉar ĉi tiu mia filo estis mortinta, kaj denove vivas; li estis perdita, kaj estas trovita. Kaj ili komencis esti gajaj.

Sed la pli maljuna filo estis sur la kampo; kaj kiam li venis kaj alproksimiĝis al la domo, li aŭdis muzikon kaj dancadon. Kaj li alvokis unu el la knaboj, kaj demandis lin, kio estas tio. Kaj li diris al li: Via frato venis, kaj via patro buĉis la grasigitan bovidon, ĉar li ricevis lin sana. Sed li koleris, kaj ne volis eniri; kaj lia patro elvenis, kaj lin petegis. Sed li responde diris al sia patro: Jen tiom da jaroj mi servas al vi, kaj neniam mi malobeis vian ordonon, tamen vi neniam donis al mi kapridon, por ke mi estu gaja kun miaj amikoj; sed kiam venis ĉi tiu via filo, kiu formanĝis vian havon kun malĉastistinoj, vi buĉis por li la grasigitan bovidon. Kaj li diris al li: Filo, vi estas ĉiam kun mi, kaj ĉio mia estas via. Sed konvenis esti gajaj kaj ĝoji; ĉar ĉi tiu via frato estis mortinta, kaj denove vivas; li estis perdita, kaj estas trovita".

Al skribistoj kaj fariseoj kiuj kritikas Jesuon pro lia teniĝo al la pekuloj, fakte Li ne nur ilin akceptas sed eĉ li manĝas kun ili, - kaj tio signifas komuniki kaj komunikon de vivo - Jesuo sin

turnas per tri paraboloj. Ni jam konas la unuan, ĝi estas tiu pri la perdiĝinta ŝafo, la dua estas tiu pri la monero kaj la tria estas tiu pri kiu temas la hodiaŭa liturgio, nome tiu konata kiel “la erarinta filo”.

La mallongeco de la filmeto ne permesas la analizon de la tuta evangelipeco, kaj ni konsideras tie nur ties esencajn elementojn. Tiu ĉi filo agas ĉiam kaj absolute nur profitcele. Estas la profito kiu kaŭzas lian vivmanieron kaj lian pensmanieron. Profitcele li forlasis la domon de la patro kaj nun, profitcele, ne pro konscienciproĉo, li volas hejmenreveni.

Fakte, la evangeliisto skribas ke: “Tiu knabo revenis al si kaj diris: “Kiom da dungitoj de mia patro havas panon abunde”. Al li ne mankas la patro, al li mankas pano. Do, kiel profitcele li forlasis la patran domon, nun li, profitcele, revenas hejmen. Sed li pretigas al si tion kion ni povus nomi “la pentesprimon”, kaj do li pretigas al si la frazon por esti akceptata: “mi jam ne meritas esti nomata via filo”, ĉar, laŭ la jura sistemo, li ne povis plu esti tia ĉar li disipis sian tutan heredaĵon: **“**Faru min kiel unu el viaj dungitoj”.

Nu, la centra punkto de la parabolo estas la sinteno de la patro pere de kiu Jesuo anoncas la sintenon de Dio al la pekulo. Ni vidu ĝin.

“Kiam li estis ankoraŭ malproksime, lia patro lin vidis**”,** la filo forlasis la patron, sed la patro ne forlasis sian filon. Do, li atendas lin; li respektis lian liberecon, sed lin ne forgesis. “Li kortuŝiĝis”, ‘kortuŝiĝi’ tie estas teknika termino kiu indikas dian agadon per kiu oni revivigas iun kiu ne havas vivon, kaj la trian fojon tiu termino aperas en la Evangelio laŭ Sankta Luko.

La unuan fojon tiu vorto aperas kiam Jesuo revivigas la solan filon de la vidvino el Nain, kaj la duan fojon ĝi aperas dum la agado de la samariano al la misŝanculo. “Li kuris renkonten al li”, estas strange trovi tiun esprimmanieron. En la orienta mondo kuri estas malhonorigaĵo – tie la tempoj estas ege pli malrapidaj kaj pli senstreĉaj, kaj neniam patro kuras renkonte al la filo, eventuale estas la filo kiu kuras renkonte al la patro.

Nu, tie ĉi estas la patro kiu kuras renkonte al la filo; li ne atendas, ofendite, senemocie ke la filo petu lin pri pardono, sed li kuras al li renkonte. Por la patro la deziro redoni honorindecon al la filo pli gravas ol lia honoro mem. La patro malhonoriĝas por redoni la honorindecon al la filo; kaj ne nur, “li falis sur lian kolon”. La patro ne devigas la filon purigi sin, ni scias ke li estis porkpaŝtisto, do li estis malpura, sed la patro surprenas la malpurecon de la filo brakumante lin.

La deziro de la patro purigi la filon estas pli forta ol lia pureco mem; la patro fariĝas malpura por doni la purecon al la filo, “kaj lin kisadis”. Ĉar tiu esprimo: “li falis sur lian kolon kaj lin kisadis”devenas de la unua granda pardono kiu troviĝas en la Biblio, en la Libro de Genezo, ĉe la 33a ĉapitro kie Esav sukcesas pardoni sian fraton Jakobon kiu pere de trompo forrabis lian heredaĵon,

Esav agas sammaniere, “li ĵetis sin sur lian kolon kaj kisis lin”. La kiso simbolas la donacon de la pardono. Tio kio ĉi tie estas sensacia estas la fakto ke la patro pardonas la filon antaŭ ol la filo petu lin pri pardono. Do la filo ne devas peti la patron pri pardono, sed estas la patro kiu ĝin donacas al li. Sed la filo ne fidas, oni iam ajn ne scias... tiam li klopodas eldiri tiun frazon kiu li jam pretigis; sed la patro ne lasas ke li ĝin finparolu.

Super ĉio li malpermesas al la filo eldiri la duan frazon, “Faru min kiel unu el viaj dungitoj**”.** Sed la patro diris al siaj servistoj...” - kaj ĉi tie estas tri agoj tre precizaj - “alporti la ĉefan robon”. Kial alporti la ĉefan robon? Kion tio signifas? Ne temas tutsimple pri robŝanĝo, ĉar li estis malpura, kaj

li nun surmetas puran veston. Sed la ĉefa robo signifas aŭtoritatecon kaj dignon kaj ĉi tie oni rilatas al la historio de Jozefo kiu estis enkarcerigita ĉar li estis kalumniita, kaj, kiam la faraono malkovras lian senkulpecon tuj redonas al li dignon kaj liberon. Kiel? Pere de donaco de bela robo.

Do la patro redonas al tiu ĉi filo kiu maldigniĝis aŭtoritatecon kaj dignon eĉ pli grandan ol tiujn kiujn li konis. “La ringo sur lian manon”, ne temas pri simpla juvelo. Ĝi estas la ringo kiu entenas la familian sigelon, nome, praktike la patro nomumas lin kiel administranton de la domo, ĉar per tiu ringo oni presis sur vaksotabulon kaj ĝi entenis la familian sigelon por aĉeti kion ajn.

Al tiu ĉi filo, kiu montris ke li estas nekapabla el administra vidpunkto, la patro redonas ne nur la perditan konfidon sed eĉ pli grandan konfidon, li nomumas lin administranto de la domo. “Kaj la ŝuoj sur liaj piedoj”. Kial la ŝuoj? La servistoj en la domoj marŝis per nudaj piedoj, estis nur la mastroj kiuj uzis la ŝuojn. Tiam al tiu ĉi filo, kiu opinias ne plu meriti esti traktata kiel filo, sed nur kiel servisto, la patro diras: “Ne, vi devas esti traktata kiel filo”.

Do, jen kial li devas surmeti ŝuojn sur siajn piedojn, ili simbolas la liberon kaj ne la kondiĉon de la servisto.

Kaj poste ili komencis “esti gajaj”. La evangeliisto celas diri al ni ke la renkonto de Dio kun la pekulo ne estas tiu ĉiam deprima kaj humiliga pri la listo pri niaj kulpoj, sed ĝi estas tiu ĉiam entuziasmiga pri la grandeco kaj riĉeco de la amo de Dio.

Tamen tiu ĉi mesaĝo ne estos akceptita de la skribistoj kaj de la fariseoj kaj, en la dua parto de la parabolo, la evangeliisto montros la sintenon de la pli aĝa filo kiu ĉiam servis kaj obeis la patron - do, li estas bildigo de la fariseoj kiuj obeas al Dio, kaj ĝuste ĉar ili obeas Lin, ili neniam perceptas la grandecon Lia amo.